# *Miguel Díaz-Canel kunsidos kun la estraroj de la municipaj regorganoj.*



Havano, 11 mar (RHK) La kuba prezidento sciigis ke hodia? kaj morga? la 12-an li estos en laborkunsidoj kun la prezidantoj de la administraj konsilantaroj de ?iuj kubaj municipoj por pritrakti la prioritatojn en la registara mastrumo.

Tian anoncon li faris per sia konto en la socia reto Twitter, unu el la ejoj al kiu movi?is la mondaj hegemonioj de komunikado, kaj el ?i li defendas la veron, kongrue al la etiko kaj morala supereco de la Revolucio.

La prezidento inkluzivas tiujn ?i laborsesiojn en sia tagordo labora post fini la unuan ciklon de vizitoj tra la tuta lando kaj la speciala municipo Insulo de Junularo, por kontribui al avancigo de stagnitaj aferoj kaj eltrovi la plej bonajn solvojn.

Li petis al ?iuj institucioj agi unuece, kun disciplino, integrala analizo kaj rigoro por atingi ke la enormaj potencialoj de nia socio reali?u pere de konkretaj rezultoj, tio estas, kresko, evoluo kaj prospero.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/185511-miguel-diaz-canel-kunsidos-kun-la-estraroj-de-la-municipaj-regorganoj

**Radio Habana Cuba**